naski hibridan lingvon, sed oni jam spertis kiom da fantazio povas okazi sur la lingva kampo malgraŭ la fakto ke jam ekzistas multjare provita solvo en Esperanto.

Aparte grava por ni estas la jena diro en ĝia raporto (DOC. 7171-COM/544):

> „..... La Sekcio konsideris, ke la kreo de tute artefarita lingvo estas projekto tro akademia kaj veršajne ne atingus bonajn rezultojn aŭ la necesan kunlaboron en plenumiĝo kiu estas esenca por la sukceso de tia klopodo." (p. 288)

El tio estas tute evidente, ke la Sekcio aŭ ignoris aŭ ne konscias pri la atingoj de Esperanto. Estas tre dezirinde, ke ĉiu Esperantisto skribu al la Sekretario de Sekcio ILA, ICAO, Montreal, atentigante pri la ekzisto kaj disvasteco de nia lingvo.

C. C. GOLDSMITH, Ĝenerala Sekretario de UEA.

614.25(52)

614.25(52) : 408.92 + 61(05) = 089.2

JAPANAJ MEDICINISTOJ ESPERANTISTAJ AKTIVAS.

En Japanujo de la 1-a ĝis la 5-a de Aprilo, 1951 okazis en Tokio la 13-a Tutjapana Medicina Kongreso, unua evento post la milito, ĉe kiu ĉ. 18 000 kuracistoj aŭ medicinistoj el tuta Japanujo partoprenis. Lia Majesto Tenno, usonaj altranguloj, multaj eminentuloj kaj aliaj honore ĉeestis ĝin. La unua ankaŭ solene salutis la tutan ĉeestantaron.

Kaptante ĉi tiun šancon, japanaj Esperantistaj medicinistoj ankaŭ okazigis la postmilitan renovigitan kunvenon de Japana Esperantista Medicina Asocio (JEMA). Tie partoprenis 29 medicinistaj kaj 4 nemedicinistaj samideanoj. Ĉe la malfermo D-ro H. Shinoda el *Yamagata* unue salutis la tutan ĉeestantaron, kaj Prof. Yagi el *Okayama* Universitato estis elektata kiel la prezidanto, kaj li ankaŭ salutis. Prof. Suzuki el *Tiba* Universitato informis pri la baldaŭ en Tokio eldonota esperantlingva *„Medicina Revuo"*, kiu post ne longe aperos sub lia ĉefredaktoreco. Prof. Ura el *Okayama* Universitato klarigis pri *„Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio"* (TEKA), kiu estis unue fondata en 1908 laŭ la alvoko de D-ro W. Robin de *Warszawa*, dum la 4-a Universala Kongreso en *Dresden*. D-ro H. Shinoda ankaŭ klarigis pri *„Internacia Medicina Revuo"* (IMR), kiu estis depost 1925 kiel oficiala organo de TEKA redaktata ĉefe de D-ro M. Briquet de *Lille;* kaj li antaŭ ĉio kore bedaŭris, ke TEKA, kies nuntempa provizora Prezidanto estas Prof. G. Canuto de *Parma*, nun ankoraŭ inerte dormadas depost la milito, kaj ĝia oficiala gazeto IMR ĉesigis sian aperadon post la lasta apero en 1937. D-ro H. Shinoda ankaŭ prezentis la teknikan vortaron *„Medicina Vortaro"* de D-ro M. Briquet, ĝin montrante al ĉiuj ĉeestantoj; kaj li plue montris la lastatempan italan medicinan revuon „Giornale di Clinica Medica", kiu estas nuntempe eldonata, unika medicina revuo kun Esperanta resumo.

Plue gaja sinprezentado kaj vigla diskutado okazis pri kiel oni devas aktivigi la renovigitan JEMA. Oni memore fotografis kaj disiĝis promesante revidon post 4 jaroj.

Samideanaj kuracistoj en ĉiuj landoj! Estu kuraĝigitaj per la laŭdinda agado de japanaj kuracistoj samideanaj kaj klopodu por la revigligo de inerta TEKA. Kuracistoj, kiuj volas ageme alvoki al JEMA aŭ TEKA, rekte informu al D-ro H. Shinoda. Lia adreso estas: D-ro Hideo Shinoda, Kasumicho, Yamagata-shi, Japanio.

061.22 ISAE

ISAE-INFORMOJ.

61. **Scienca Revuo.** La eldonisto informis, ke li ne plu povas akcepti abonojn el landoj, el kiuj oni ne sukcesis sendi pagon, nome: Bulgarujo, Ĉehoslovakujo, Hispanujo, Hungarujo, Japanujo. Ni plu sendos la revuon al tiuj membroj, kiuj sukcesis en ia maniero tamen sendi pagon, ekz. per turista interšanĝo aŭ per donacoj el aliaj landoj aŭ per libroj. Aliaj bonvolu kontentiĝi per membreco kiel aprobantoj, kiuj ne ricevas la revuon kaj kiuj pagas nur 2 anglajn šilingojn aŭ egalvaloron (al la delegito).

62. **Unio de internaciaj asocioj (UIA)** sendas al ni regule sian monatan bultenon, kiu i.a. enhavas liston de venontaj internaciaj konferencoj. UIA proponis al ni membrecon kiel „korespondanta organizo". Kredeble ni akceptos la inviton, ĉar ni povas uzi la servojn de tiu unio, eble ankaŭ por peri kotizojn.

63. **La jarkunveno de ISAE** okazis la 6-an de aŭgusto en la universitato en München sub prezido de dipl. inĝ. C. Dellian, germana delegito de ISAE. Raporto venos.

64. **Svisa delegito de ISAE:** D-ro Oskar Huber, UETENDORF (Bern). La jarkotizo kun revuo estas 6 svisaj frankoj.

65. **La komitato por Scienca Revuo** laŭ punkto 10 de la statuto konsistas el la redaktoro, unu reprezentanto por la estraro de ISAE, kaj unu reprezentanto por la eldonisto. Tiuj personoj estas: s-roj W. P. Roelofs, G. F. Makkink, J. Muusses, ĉiuj en Nederlando.

66. **Inĝeniero Karl Wästfelt,** Svedujo, membro kaj revizoro de ISAE, mortis la 22.8.1951.

67. **Terminologia fako.** S-roj E. D. Durrant, I. Lapenna, C. Naoumoff fondis angla-francan elektroteknikan vortaran komitaton kun fakuloj el BESA kaj la franca sekcio de ISAE. Gvidanto estas s-ro Naoumoff.

Sven Alexandersson